

Dansk



ESPERANTO-BLAD

UDGIVET AF
ESPERANTIST-
FORENINGEN
FOR
DANMARK

★

ELDONATA DE
CENTRA DANA
ESPERANTISTA
LIGO

★

30. ARG.
NOVEMBER 1958
NUMMER

11



— Hvem er dog den stakkel?
— Det er Hansen. Han gav sig til at studere alverdens
sprog for at kunne rejse ud og snakke med hvem som
helst. — Nu ser det ud til, han er på vej.

DANSK ESPERANTO-BLAD

udkommer den 15. i hver måned.

Stof må være redaktøren i hænde senest den 25. i den foregående måned.

Redaktør: E. Skjerninge,
Vinkelvej 2, Hvalsø.

Ekspedition: Arne Kolle,
Landlystvej 48, Silkeborg.

Postkonto 57274.

Abonnement: 8 kr. pr. år.

Eksterlanda jarabono 8 d. kr. aŭ 14 re-
spondkuponoj aŭ 16 U. L.-steloj.



D. E. F.
meddeler:

at ca. 70 personer deltog i en meget vellykket karavanefest i Vejle lørdag den 18. okt., og at der deltog omtrent 60 i den følgende uge i efterårskursus, heraf omtrent 10 børn, der sammen med næsten lige så mange fra Vejle udgjorde det børnehold, der blev ledet af hr. Nederland i tilknytning til hans instruktionskursus. Det blev den helt store oplevelse.

at Idrætsskolen i Vejle efter udvidelsen er blevet så stor og hyggelig, at samtlige deltagere i vore efterårskursus var ovenud begejstret. Bedre sted og bedre forhold kan næppe tænkes. Også De bør tage dertil for at være med en uge. Reservér en uge af Deres ferie til næste efterår.

at sommerkursus i Helsingør 1959 finder sted i ugen 25/7—1/8. Reservér også denne tid til Dem selv og giv Dem selv denne ferie blandt deltagere fra mange forskellige lande.

at ejeren af katalog nr. 827 ikke har meldt sig, og at præmien derfor blev foræret til 2 børn, Per og Lizzie Egholm, Aabyhøj, der kom til Vejle og deltog hele ugen.

at Zamenhofs fødselsdag 15/12 også er „bogens dag“. Alle E-ister bør, for at støtte E-litteraturen, købe mindst een bog til den dag. De gavner også Dem selv ved at læse den og dygtiggøre Dem. Indsend 5 eller 12 kr. eller andet beløb, til girokonto 16295 (Dansk E-Førlag, Aabyhøj) og skriv bag på indbetalingskortet på kuponen til modtageren, at De ønsker „Sur insulo malproksima“, „Dekkinga fugas“ eller anden bog, og den bliver Dem omgående tilsendt sammen med et ark af vore mærkater.

Dankon!

Al s-ro E. Windeballe, kiu dum 3 jaroj ĝis ĉi tiu numero estis presprovleganto de DEB, ni ŝuldas tre sinceran dankon pro granda helpemo kaj efika prilukto de la preseraroj.

Dankon krome al s-ino Iburg, kiu je la pasinta numero cedis pri la posteno kiel redaktoro de „La Kluba Vivo“, posteno malfacila pro multe da materialo por malmulte da spaco. Kaj tamen s-ino Iburg tre laŭdinde plenumis sian taskon.

La nova presprovleganto estos s-ro Engelbrecht Hansen, Holbæk.

OKAZE DE LA 44-a U. K. en Varsovio la pola turisma oficejo eldonis prospekton pri Varsovio. Senpage ricevebla de la pola vojaĝoficejo „Orbis“ en ĉiuj landoj.

Deziras korespondi:

11-jara Há-Quang-Van, 38 pliô Huê, Hánoj, Vietnamio.

15-jara Há-Quang-Son, 38, strato Huê, Hánoj, Vietnamio.

21-jara studento B. Kudizka, Ragučio 39—2, Kaunas 8, Litova, SSR.

DANSK ESPERANTO-FORLAG

Ingemannsvej 9, Aabyhøj.

REKORDO EN VEJLE!

Denove ĉijare la nombro de partoprenantoj en Vejle estis rekorda. 60 personoj el 6 landoj partoprenis en la internaciaj aŭtunaj kursoj. Rimarkinde multaj el ili estis infanoj.

Kvankam en malpli oportuna sezono, la Vejle-kursoj tiel nun estas survoje al simila pozicio, kian okupas jam de antaŭ longe la ĝemela aranĝo en Helsingør. — Kaj nova rekordo estas atendebla venontjare kiam la famo de la lukse renovigita sportlernejo disvastiĝis per entuziasmaj partoprenintoj.

La instruado okazis kiel antaŭe kun s-ino *Zacho* kiel gvidanto de la komencanta kurso, *Ida Christensen* de la konversacia, *Moravec* de la perfektiga kaj *Ole Nederland* de la pedagogia.

Tre interesaj programoj plenumiĝis en la vesperoj per la helpo de f-ino *Noll* („Je memoro de Zamenhof“), *Tibor Zekelj* (kiu faris belegan lumbildparoladon pri sia restado en Nepalo) kaj de *Fr. Föttinger* el Aŭstrujo (kies bildoj inspiris al vizito al lia montara hejmlando).

Ankaŭ la vojaĝfilmoj de s-ro *Friis* kaj *Søgaard-Hansen* rikoltis merititan aplaŭdon, kaj en aliaj vesperoj okazis magnetofona enregistraĵo de voĉoj, kaj sabate la finfesto kun kontribuoj de jugoslavo, portugalo, aŭstro, svedoj, germanoj kaj danoj.

Bela vetero, la arbaro denove multkolora allogilo por freŝaj promenoj, kaj laste kiel komence: Kia kunvenejo!

Gratulon al s-ro *Friis* pri solida sukceso sekvinta el modela aranĝo.

1612,01 gld.

estas kolektita kiel komenco de la Fondaĵo-Zamenhof, financa bazo de la grandaj festoj okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. Oni esperas multob-

ligon per „libervola imposto“ de ĉiu esperantisto, kiu laŭpropone enpagu unu milonon de sia jara enspezo al la fondaĵo.

La kolektitajn sumojn oni bonvolu sendi rekte al la Centra Oficejo de UEA, Eendrachtsveg 7, Rotterdam C., aŭ al la ĉefdelegitoj kaj perantoj de UEA en diversaj landoj kun klara mencio „Por la Fondaĵo-Zamenhof“.

Sendu telegramon . . .

al FN! — En la artikoleto tiunome en n-ro 10 enŝteliĝis eraro. Limdato por sendo estas 31/12. Pro praktikaĵoj cetere estas preferinde, ke oni sendu la informojn al *Erling Knudsen*, Østergade 21, Fåborg. Knudsen estas la komisiito de Centra pri la afero.

Rusaj sciencistoj trovas novan metodon por rapidigi la degelon

Eksperimentoj lastatempe faritaj de rusaj sciencistoj ĉe la enlanda lago Rybinsk, ĉirkaŭ 200 mejlojn norde de Moskvo, malkaŝis lertan kaj malmultekostan metodon por rapidigi la printempan degelon sur glaci-baritaj ŝipvojoj. La sciencistoj bazis siajn eksperimentojn sur la principo, ke blankaj surfacoj respegulas preskaŭ la tutajn de la sunradioj, dum nigra aŭ malhela surfaco sorbas tiujn radiojn. Ili sekve kovris plurajn partojn de la lago per karberetoj, kaj montriĝis, ke la glacio degelis sufiĉe por tralasi ŝipojn proksimume ok ĝis dek tagojn antaŭ ol tiuj regionoj, kie la glacio ne estis tiel traktita. La kosto de la eksperimento estis konsiderinde malpli ol komparaj kostoj de glacirompiloj aŭ kutime uzataj por tiu ĉi laboro.

*Laŭ Unesco-Features kaj
UEA-Infoservo.*

44-a Universala Kongreso de Esperanto

Varsovio 1.—8. aŭg. 1959 Pollando

Sub honora protektado de la Ministro-Prezidanto de la Pola Popola Respubliko Jozef Cyrankiewicz.

1. Oficiala Komuniko

Adreso: 44-a Universala Kongreso de Esperanto, Varsovio, Pollando.

Banko: Narodowy Bank Polski, Warszawa, VII. OM. n-ro 1531-9-525.

Kotizoj: (en dolaroj).

Kongresano	6
Edz(in)o	3
Junulo ĝis 20 jaroj kaj studentoj	2

Individuaj membroj de UEA rajtas rabaton de 1 dolaro. Edzino de I. M. ricevas rabaton de 0,50 dolaro.

La kotizo rajtigas al senpaga partopreno en ĉiu programo organizita de LKK kaj al regula ricevado de la kongresdokumentoj k. a. Aliĝo rekte per banko aŭ ĉe la peranto (G. Kühlmann, St. Jørgensgade 4 A, Kbh. N.).

Societaj vesperoj povas profiti el jena disponebla materialo, kiu informas pri Varsovio:

- Baza artikolo por prelego pri V.
- Magnetofona programo pri V.: ĉ. 15' muzika kaj parola surbendigo.
- Turismaj broŝuroj en E. pri V.

La nomita materialo senpage akirebla de societoj aliĝintaj al landa asocio.

Pri ellaso de vizoj la LKK jam faris koncernajn paŝojn por ĝis ekstremo faciligintan.

G. C. Fighiera.

1-a Oficiala Bulteno

jam aperis. Per 6 bele kompostitaj paĝoj ĝi

donas la provizoran programon kaj ĉiujn ĝisnunajn informojn. Krome ĝi enhavas la aliĝilon.

„PACIFISTEN“, organo de la dana fako de „War Resisters' International“, elsendis (danl.) sian 25-jaran jubilean numeron. La jubilea numero same kiel ĉiuj aliaj enhavas fortan pacifistan manifestacion kaj estas havinda de ĉiuj pacamantoj, kiuj laŭ pure pacifisma vidpunkto deziras akceli la pacon; havenda de aliaj. Enhavo i. a.: „Naziheredaĵo“, „Neniam plu milito“, „Bombo eksplodis“, „Disdono de la vivrimedoj“, „La eksterlanda kaj enlanda politiko de Norvegujo en la kadroj de NATO“, „Perspektivoj de la atomaĝo“. Krome poemoj de Øverland, Torborg Nederaas kaj Heinrich Lersch. — Ekspedicio: E. Mathiasen, Lysbro, Silkeborg.

EN HOTELO EN NICE pendas jena avertilo: „Por niaj estimataj gastoj el Britujo! — Ni petas ĝentile, ke vi ne parolu france al la funkciuloj, ĉar plej ofte ili ne komprenas vian francan prononcadon.“ — (Internacia Gazetara Servo.)

Da H. C. Hansen

ville ønske nogle udenlandske diplomater velkommen til Danmark, kom jeg tilfældigvis til at åbne for radioen og blev meget forbavset over, hvordan han radbrækkede det engelske sprog, og blev tillige forundret over, at der ikke ved sådan en lejlighed blev benyttet en tolk, som kunne tale det engelske sprog rigtigt.

Det er en selvfølge, som følger af sig selv, som man siger, at vore politikere, der bliver sendt til udlandet for at tale Danmarks sag, nærmest gør sig latterlige, når de ikke behersker sproget bedre. Så kan man ikke forundre sig over, at man ikke tager os alvorligt.

(Af et læserbrev
i „Vestkysten“ 14/5)

Graversen mortis



La 21-an de oktobro mortis s-ro C. Graversen en Esbjerg, preskaŭ 73-jara. Finiĝis la vivo de entuziasma esperantisto kaj granda idealisto. Li dum multaj jaroj batalis por Esperanto en nordokcidenta Jutlando kaj poste en Esbjerg. Li estis aktiva membro de la ĉefestraro de CDEL dum 5 jaroj kaj tie havis la gravan postenon kiel afergvidanton. Post sia eliro el la ĉefestraro en 1955 li daŭre prizorgis la administrajn aferojn de DEB, ĝis kiam la malsano devigis lin ĉesigi ankaŭ tion. Sed oni ankaŭ memoros lin kiel poeton kaj tradukanton. Ekzistas multaj belaj poemoj de lia mano, kaj li eĉ gajnis premiojn en literaturaj konkursoj. Li kunredaktis la espereble baldaŭ aperontan Danan Antologion kaj multe kontribuis al la tradukado. Krome li tradukis plurajn librojn. Li estis reprezentanto por Universala Ligo en nia lando.

Kiam mi fariĝis prezidanto de CDEL, mi ekkonis Graversen kiel modestan kaj sim-

patian homon, kiu volonte volas fari laboron por Esperanto. Kun akurateco li prizorgis siajn taskojn, neniam li „ne havis tempon“. Ĉiam li estis preta fari sian kontribuon al nia afero. Mi tre alte estimis kaj estimas tiun entuziasman batalanton, kiu havis noblan koron kaj altajn idealojn. Ni neniam forgesos nian samideanon, nian kunbatalanton, nian kolegon kaj nian kameradon C. Graversen, kiu nun ne plu estas inter ni.

Honoron al lia memoro!

Svend Dragsted.

KARUSELVOJAĜOJ okazos en la venonta somero tra Amsterdam, Köln, Wiesbaden, Luxemburg, Bruxelles, Amsterdam. La buso, kiu transportos la pasaĝerojn, veturados laŭ la vojaĝplano la tutan someron de 22/7. Oni povos eniri kie ajn laŭ la vojo kaj eliri samloke ĉe plenumo de la cirklo. Prospekto de *Hans Bakker*, v. Tuyl v. Se-rooskerkenplein 33, Amsterdam-Zuid, Nederlando.

AGRABLAN SURPRIZON

vi havos kvin fojojn dum la jaro se vi abonas la revuon

Norda Prismo


la socia, kultura kaj literatura revuo. Redaktoro: F. Szilágyi. Redakcia komitato: B. Ragnarsson, Islando. H. Rosbach, Norvegujo. V. Setälä, Finnlando. P. Thorsen, Danlando.

Abonprezo: 10,00 sv. kr. Abonu per nia poŝtĉeka konto: 15 54 80, aŭ ĉe via landa libroservo. Specimennon kontraŭ 2 respondkuŝonoj.

*Norda Prismo,
Barnhusgatan 8,
Stokholmo.*

De sammensatte former

Frk. Noll har sendt os denne lille anskueliggørelse af de sammensatte udsagnsord i Esperanto.



Til yderligere forklaring plejer frk. Noll at opstille udsagnsordet således:

-as		-as	
-is	-anta	-is	-inta
-os		-os	
	-as		
	-is	-onta	
	-os		

Prøv at pusle lidt med det lille skema.

Novaj libroj

Julio Baghy:

SONĜE SUB POMARBO

Triakta lirika komedio en ses fantaziaj bildoj. — Antaŭparolo de Marjorie Boulton. — Kovrilo de John Hartley. — Dekoracioj de Stefano Barta. — Portreto de la aŭtoro. — STAFETO. Bel-literatura Eldon-serio, 14. — J. Régulo, Eldonisto, La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1958. — 16 × 22 cm. 232 paĝoj. — Prezo: 1,80 usonaj dolaroj, aŭ egalvaloro, plus sendkostoj.

Se oni apartenas al tiuj, kiuj nur malvolonte eklegaŝ dramon — kaj nur pene finlegas, oni ne estas kaptata de entuziasmo, ricevante grandan dramverkon por recenzo! Kaj se ĝi plie estas versdramo, oni preskaŭ senesperigaŝ! Eĉ se la verkisto estas la granda Julio Baghy! — Kaj la temo! Pri Adamo kaj Eva! — Kiuj grandaj verkistoj ne jam okupis sin pri tiu antikva, teda historio! — Jes, tiel oni eble pensas.

Sed strange! — Komencinte la legadon de „Songe sub pomarbo“ oni tuj estas kaptata. Oni ne povas lasi la libron. Oni ĝuas la elegantajn versojn, la belsonecon de la strofoj; oni admiras la saĝecon, sed eĉ pli la junecon de la maljuna aŭtoro — jes, oni pensas: „Ĉu ne tiu verko estas la ĝis nun plej bela de Baghy?“

Adamo, juna studento, kaj Eva, junuli-

1250 RADIOELSENDOJ EN ESPERANTO akazis en 1957, informis CED. La elsendoj venis de 18 radiostacioj en 11 landoj.

Svend Dragsted: **ESPERANTO** **GRAMMATIK**

Fås hos klubbernes bogsælgere
eller hos CDEL's Libro-servo

Heftet: Kr. 4,50
Indbundet: Kr. 6,50
Uundværlig for
danske
esperantister

no kamparana, renkontiĝas, reciproke enamiĝas, sidas kune sur benko sub la geava pomujo en la somera nokto kaj endormiĝas. Songe ili rigardas ne nur la spektaklojn de la ordinara praktika „amo“, sed ankaŭ la finan stadion de la teknika, cerba evoluo de la homa gento. Ili pere de noktaj, magiaj fortoj travagas jarmilojn kaj sur ekrano vidas la inferon de la estonta homaro, la plenan maturiĝon de la homa cerbo — koste de la koro! Ili spertas la diferencon inter ESTO (ekzisto) kaj VIVO! Kaj vekiĝinte ili kune eniras la ĉielon de la amo por sidi sub la arbo de vivo!

Mirinde, ke homo, kiu persone travivis tiom da kruelaĵoj kaj senespero, kiom faris Baghy, en la aŭtuno de sia vivo povas doni al ni tiom printempan, eĉ optimisman verkon! Vere, la homa koro povas esti nevenkebla!

Marjorie Boulton donis impresigan antaŭparolon en persona, preskaŭ intima stilo.

Pri la ne malmultaj preseraroj la eldonisto klarigas en postparolo. Ke eĉ ne Baghy ĉiam povas tute eviti „platajn“ rimojn (te-

ro—etero, monstre—demonstre), oni facile pardonas kaj forgesas pro la riĉo de brilaj pensoj kaj esprimoj.

Vere, tiu libro meritas esti entuziasme salutata de la esperanto-mondo.

La eldonejo meritas dankon pro la plaĉa ekipo de la libro, al kiu ankaŭ nia malnova amiko Stefano Barta kontribuis per siaj bildoj de la scenarangoj.

H. E. J.

KANTOJ POR LA PACO

Originalaj kaj tradukitaj poemoj de Canko Murgin, str. Iskâr 46, Sofio. Bulgarujo. Eld. kaj preso de EXON, Landskrona, Svedujo.

Prezo: 1 ekz. 2 int. resp.-kup. — Rabato je pli granda mendo.

Bagatela eksteraĵo, sed plaĉa; bonaj papero kaj preso. — Lerte faritaj strofoj kun ne tro da poezio. Propagando por Esperanto kaj paco, sed ankaŭ por Sovetio. Iom tro da malperfektaĵoj, ekz.: „Estingiĝas lum' ĉe l' fin' de l' tag' serena“ — tro da apo-

LIBRO-SERVO DE CDEL

Hviddingvej 52, Rødovre/Valby, telf. 70 04 74, giro 13 652

GAVEIDEER

K. E. K. (Konversacia Esperantista Klubo), festschrift, 45 s., mange billeder, indeholder hele foreningens udvikling gennem 50 år . . .	kr. 5,00
Angla Antologio, indb.	„ 20,00
Sciencaj studoj, heftet	„ 25,00
Eseoj I, de G. Waringhien, 232 s.	„ 12,60
Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj, de dr. agro Paul Neergaard	„ 22,00
Fundamenta Krestomatio, de Zamenhof, indb.	„ 19,00
Nye danske mærkater, 5 forskellige, 25 stk. på hvert ark	„ 0,75
Bordflag, silke, med ubetydelige fejl, nedsat pris	„ 2,50
Grønne klæbestjerner, pr. 100 stk.	„ 1,50
Julekort, nye, pr. stk. 15 øre, 12 stk. for	„ 1,50
Kuverter, pr. stk.	„ 0,05

Et stort udvalg af bøger fra kr. 2,00 føres altid på lager, ligesom vi fører alt i lærebøger, ordbøger til undervisning og selvstudium.

Endvidere tegnes abonnement på vore mange udenlandske blade og tidsskrifter.

HEROLDO

DE ESPERANTO

Duonmonata internacia organo de
la Esperanto-movado

Prezoj en 1958

Abono tutjara kr. 22,00
Abono julio-decembro .. kr. 10,00
Anonceto ĝis 25 vortoj .. kr. 3,50
Anonceto 26 ĝis 50 vortoj kr. 7,00
Anonco pokvadratcentimetre 0,60

Pri HEROLDO-libroj petu libro-
liston

Dana peranto



Sino G. JAKOBSEN
Carit Etlarsvej 14,
Aabyhøj.
Poŝtkonto 54133.

FOTO

Aftryk

til meget fordelagtige priser. Således kun
26 øre for et 6 × 9. Ved 8 stk. og derover
af samme negativ kun 22 øre pr. stk.

Forlang prislister!

Mange års erfaring med forsendelsesfor-
retning. Garanti for omhyggelig udført ar-
bejde.

Telf. 357.
Giro 66122.

Nia Foto,
Bjerringbro st.
v/Henning Nielsen,

strofado. Post ŝtonjeto en akvon „ekrulos
rondondet“ — kial ne „ringondet“? —
Kelkfoje malbonaj vortkunmetoj: mond’-
ul’maljuna, senkompatkruela. Perloj tamen
troviĝas, precipe en la modestaj „Epitafoj“:

Pro konsidero
tute malplena
kaj senespero
pli ol venena

li ekhezitis
dronis en dubon
kaj ne vizitis
plue la klubon.

H. E. J.

DANSK VEGETARISK FORENING

varetager vegetarernes fællesinteresser. Der kræves
intet løfte af medlemmerne. Kontingent 7 kr. årligt.
Ægtepar 8 kr., inkl. abonnement på VEGETARISK
TIDSSKRIFT. Forlang gratis prøvenummer. Adres-
se: Agade 114, II, København N. Telefon: Gothåb
1163 u.

Ni rekomendas al Esperantistoj

restadon en nia unuaklasa hotelo. —
Esperanto parolata.

HOTEL DANIA, Silkeborg. Tlf. 6 - 7 - 686.

☆ Esperanto-BOGTRYK

Indhent tilbud gratis og uden for-
bindende hos Sønderjyllands ældste
og største bogtrykkeri —

MODERSMAALET'S Trykkeri

Haderslev — Telefon 22031

**Dragsteds radioforedrag: torsdag
d. 20. nov. kl. 22,35, program 1**

A-S Modersmaalets Trykkeri - Haderslev

